

La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-11-06

n-ro 347

Lampeduso: la tuniziaj migrantoj protestas kontraŭ siaj detenkondiĉoj



Preparo de la konferenco
de V4-landoj pri klerigado
por eŭropa civitaneco

Televido raportis pri etikaj
problemoj je produktado
de gumursetoj

Esperanto en la
universitata kaj lerneja
medioj en Madagaskaro

La Hodiaŭa Ĵurnalo

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

Misio

Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro

kaj grafikisto: Rafael S. Lima

Revizianto: Andrej A. Peĉenkin
[Андрей А. Печенкин]

Kontakto

hodiauajurnalo@gmail.com

Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.



Lampeduso: la tuniziaj migrantoj protestas kontraŭ siaj detenkondiĉoj

Kontraŭ siaj karceraĵ kondiĉoj p. 03

Preparo de la konferenco de V4-landoj pri klerigado por eŭropa civitaneco

Eŭropa civitaneco en elementaj kaj mezaj lernejoj p. 04

Hietori-Terapio

Varmigu la subon de via korpo kaj pli bone fluigu la sangon p. 05

Televido raportis pri etikaj problemoj je produktado de gumursetoj

Laboristaj rajtoj kaj bestoprotektado p. 06

Hodiaŭe

Robert MUSIL; William AULD; kaj Japanio p. 07

Esperigo per la vivo

Aŭtobiografio de AULD p. 08

Esperanto en la universitata kaj lerneja medioj en Madagaskaro

309 gelernantoj de kvin klasĉambroj lernas nian lingvon p. 10

Lampeduso: la tuniziaj migrantoj protestas kontraŭ siaj detenkondiĉoj

Sesdeko da tunizianoj malsatstrikas de 8 tagoj en transitejo de Lampeduso, tiu malgranda itala insulo, kien plimulte alvenas tuniziaj kaŝmigrantoj. Ili protestas kontraŭ retropuŝo laŭ nacia origino, kontraŭ siaj karceraj kondiĉoj, kaj postulas moviĝan liberecon.

La tuniziaj migrantoj rifuzas la devigan repatriigon al ilia origina lando, post ilia deteno en la transitejo de Lampeduso. Ili protestas ankaŭ kontraŭ siaj nehumanaj detenkondiĉoj.

«La homoj vere suferas. Ĉio mankas ĉi tie. Ni havas nek decajn lokojn por dormi, nek duŝojn. La homoj vere spertas malfacilaĵojn», atestas junulo detenita en la centro de Lampeduso, kaj malfacile atingita per tunizia telefono.

Dum la Internacia Organizaĵo por Migrado konfirmas alvenon de 4 000 tunizianoj de post pasinta septembro, tiu nombro plu estas proksimuma, ĉar multaj kaŝmigrantoj ne estas enkalkulataj de la aŭtoritatoj. La transitejo pli kaj pli pleniĝas.

«Ni estas en la detencentro de Lampeduso. Ĉiuj novuloj venas ĉi tien. Cent personoj alvenis hieraŭ (ĵaŭdon la 2an de novembro), kaj 30 novaj personoj ĉi-matene (vendredon la 3an de novembro). Ni estas preskaŭ 500 personoj en la detencentro. Ĉiuj estas tunizianoj, krom 3 aŭ 4, kiuj estas sudananoj», daŭrigas la junulo.

La ŝtatsekretario ĉe la ministro pri



sociaj aferoj, ŝargita pri la migrado kaj eksterlandaj tunizianoj, Adel JARBOUI, deklaris, ke inter la 10a kaj 14a de oktobro 2017, la detencentro de la insulo de Lampeduso akceptis almenaŭ 845 tuniziajn migrantojn, el kiuj 93 neplenaĝulojn.

Tiuj tunizianoj plie plendas ke ili ĉiuj estos forpelitaj, «malobserve kun la internaciaj konvencioj, kiuj garantias moviĝan liberecon». Ili estas subtenataj de tuniziaj asocioj pri la homaj rajtoj, kiuj kondamnas «nedecan traktadon kontraŭ la neleĝaj migrantoj».

Neniam Milito Inter Ni

Preparo de la konferenco de V4-landoj pri klerigado por eŭropa civitaneco

En “Nitra Deklaro”, konkluda dokumento de la lingvo-politika konferenco de V4+ (Viŝegradaĵ) landoj “Perspektivoj de lingva komunikado en EU” en Nitro okazinta inter la 28a kaj 29-a de julio 2016 sub aŭspicio de Miroslav LAJČÁK, ministro de Eksterlandaj kaj Eŭropaj Aferoj de Slovakio kiel aranĝo de la Prezidenteco de Slovakio en la Konsilio de EU, estis menciite, ke dum 60 jaroj de EU ne okazis komuna iniciato en tereno de edukado ['klerigado']: „Ĝis nun ne okazis provo evoluigi komunan edukadon ['klerigadon'] por eŭropaj civitanoj. Kialo de tio restas en la fakto, ke edukado ['klerigado'] kaj kulturo restis ekde la komenco ĝis nun je nacia nivelo en kompetentoj de EU membro-ŝtatoj.

En kunlaboro de Eŭropa Esperanto Unio (EEU) Asocio de Europa Konscio en Maribor (SI) kaj civitana organizo Edukado@Interreto en Parituzánske (SK) oni preparis projektan proponon por organizi iniciatan konferencon pri komuna edukado ['klerigado'] al eŭropa civitaneco en elementaj kaj mezaj lernejoj.

La projekta propono estis prezentita al Ŝtata Pedagogia Instituto de Slovakio, kiu konsideris la proponon kiel

pozitivan iniciaton. La 24-an de oktobro okazis unua laborkunveno pri la projekta propono. Estis interkonsentite ke la Ŝtata Pedagogia Instituto preparos informon pri la proponita projekto al Ministerio de Edukado ['Klerigado'], Scienco, Esploro kaj Sporto de Slovakio por organizi la iniciatan konferencon de



V4 landoj (CZ, HU, PL, SK) en Bratislavo la 26-an de septembro 2018 kaj petos Martina Lubyová, ministrinon de Edukado pri ŝia aŭspicio. Post ŝia decido estos preparita projekta propono por la konferenco, kiu estos prezentita al Internacia Viŝegrada

Fondaĵo kun peto pri financa subteno. Organizantoj volus inviti al la konferenco kiel ĉefparolanton Tibor Navracsics (HU), Komisionano de EU por Edukado ['Klerigado'], Kulturo kaj Multlingvismo.

Oni planas, ke la konkludoj de la konferenco de V4 landoj povas esti prezentitaj kiel iniciato de V4 landoj dum kunsido de la Konsilio de Ministroj de Edukado de EU por inviti aliajn EU landojn al diskuto pri komuna edukado ['klerigado'] pri eŭropa civitaneco en elementaj kaj bazaj lernejoj kun la celo kontraŭstari kaj haltigi negativan tendencon gvidantan al kresko de malfido de civitanoj al EU, al eŭropismo, al kresko de naciismo, ekstremismo, ksenofobio kaj interetna maltoleremo.

Jozef REINVART
Eŭropa Bulteno, n-ro 174

Hietori-Terapio

Malvarmon (hie) forigu (tori)!

Varmigu la subon de via korpo kaj pli bone fluigu la sangon

En ĉambro supre estas varme kaj sube estas malvarme. Same pri la homa korpo, la kapo estas varma kaj la piedoj estas malvarmaj. Varmaj aero kaj sango emas resti supre kaj malvarmaj emas resti sube, pro kio la aero kaj la sango ne bone cirkulas en ĉambro kaj en korpo. Por cirkuligi la aeron en ĉambro oni uzas ventumilon. Kion ni faru por nia korpo?



Kiamaniere cirkuligi la sangon pli flue en la korpo? Tre simple. Varmigu la subon de via korpo.

1. Banu vin duonkorpe en banujo pli ol 30 minutojn por varmigi la piedojn kaj krurojn. Dume via supra parto ege ŝvitas, eligante venenon akumulitan en via korpo.

2. Post la banado, por teni la piedojn kaj krurojn ĉiam varmaj, surportu 3-10 ŝtrumpetojn laŭ la seriozeco de via malsano, prefereble silkajn ĉe la haŭto kaj sur tiuj, kotonajn kaj lanajn. Evitu la artefaritajn.

3. Dum vintro metu varmakvujon ĉe viaj piedoj en lito. Post la banado kaj la surportado de ŝtrumpetoj, viaj piedoj estas tre varmaj kaj vi tuj rimarkas, kiel bone vi povas dormi ĝismatene.

Evitu avarecon kaj egoismon

1. Manĝu nur 50-70% sate. Maĉu 30-50 fojojn por ke manĝaĵoj bone digestiĝu. Ne trinku multe kaj ĉesu fumadon.

2. Havu trankvilan koron, forlasinte avarecon kaj egoismon. Tiuj estas plej malbonaj por via sano.

Mirinda efiko

Ĉiun tagon mi banas min nur subkorpe dufoje po unu horon. La efiko estas mirinda.

1. Mi havis seriozan ŝultro-doloron kaj malagrablan gorgon. Mi havis altan sangopremon. Laŭ la klarigo de s-ro

Ŝindoo, iniciatinto de tiu ĉi terapio, tiuj estas avertoj el miaj malsanaj internaĵoj, sed mi ignoradis tiujn kaj pensadis, ke mi estas tre sana. Post tri monatoj da praktiko de Hietori-terapio ŝultro-doloro, malagrablaĵo ĉe la gorgo kaj alta sangopremo preskaŭ malaperis. Krome miaj haroj multiĝas kaj nigriĝas.

2. Mi estis 75 kilogramojn peza antaŭe, sed nun mi estas 60 kilogramojn peza. Mi povas moviĝi tre facile.

3. La banado donas al mi tre bonan ŝancon trankvile legi Esperantan libron, aŭskulti muzikon, mediti kaj foje dormeti. Dume mi estas libera de ĉiutagaj ĝenaĵoj kaj havas tre riĉan tempon.

Du ŝlosiloj por via sano

1. Firme kredu, ke sano estas plej grava

por via vivo, kaj ke via sano naskiĝas el la praktiko de hietori-terapio. Sano superas ĉion. Sen sano oni faras nenion. Havu tiun ideon firme.

2. Ne timu mengen. Mengen, malbonaj simptomoj dum vi praktikas tiun terapion, estas signo de plisaniĝo. Ne timu sed ĝuu mengen. Tio konsciigas vin, kio, kia kaj kiel estas via korpo.

Kiam via malsano cedas, preskaŭ nepre aperas tiaj simptonoj.

Mi havis jenajn simptomojn: jukaĵoj sur la kruroj, poste jukaĵoj sur la maldekstra brako. Iuj plendis pri "malvarmumsimila simptomo", iuj pri multe da sputaĵoj. Kiam jukaĵoj aperas, ne ŝmiru ilin per medikamento, sed skrapu ilin por eligi venenon. Eĉ kiam malbonaj simptomoj aperas, ne subpremu ilin per medikamento. Baldaŭ ili malaperos. Vidu, kiel via korpo ŝanĝiĝas tagon post tago. Tio estas tre interesa.

Andreo BACH
Esperanta Retradio

Televido raportis pri etikaj problemoj je produktado de gumursetoj

La germana firmao Haribo produktas la famajn gumbombonojn kun formo de ursetoj ekde la jaro 1922-a, kaj ĝi dungas pli ol 7 mil homojn en dek landoj. Pasintmonate, per la publika germana televidkanalo ARD [„Arbeitsgemeinschaft der öffentlich-rechtlichen Rundfunkanstalten der Bundesrepublik Deutschland“]



"Laborkomunumo de la publikjuraj sendostacioj de Federacia Respubliko Germanio"], aperis dokumenta filmo, kiu kritikis la malbonajn okazintaĵojn ĉe la produktado de ingrediencoj de tiuj gumursetoj.

La problemoj, laŭ la raporta filmo, koncernas liveron de du produktoj fare de partneraj firmaoj el Haribo. El Brazilo

venas vakso de la palmo nomata karnaŭbo [pt: *carnaúba* kaʁne'ube], kies produktado en brazilaj bienoj supozate estas farita de laboristoj submetataj al kvazaŭa sklava laboro.

La alia ingredienco nedece produktata originas en germanaj bienoj pri bredado de porkoj, norde de la lando, kie la bestoj supozate spertas damaĝojn, laŭ bildoj prezentitaj de grupo pri bestoprotektado. La firmao Westfleisch pritraktas la haŭton de porko, kiu estas aĉetita de la bienoj kaj vendita al la firmao Gelita, kiu fine liveras ĝin al Haribo kiel gelateno.

Lastjaŭde, la 2-an de novembro, Haribo anoncis, rilate al vakso de karnaŭbo, ke oni atendas rezultojn pri enketo mendita al sendependaj juĝoficistoj.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog



Robert MUSIL

Robert MUSIL (naskiĝis la 6-an de novembro 1880 en *Klagenfurt* – mortis la 15-an de aprilo 1942 en Ĝenevo) estis aŭstria romanverkisto, dramisto kaj eseisto.

En Esperanto aperis: *La muŝkaptilo*.

Vikipedio

William AULD

William AULD [ŭiljam old], foje esperantigita per Vilhelmo OLDO (naskiĝis la 6-an de novembro 1924 en *Erith, Kent*, mortis la 11-an de septembro 2006 apud Dolaro) estis skota Esperantlingva poeto.

En Esperanto aperis pluraj verkoj kaj tradukaĵoj.

Vikipedio



Bildo de la tago


Kiyomizu-dera, Kioto, Japanio.

Vikipedio

Esperigo per la vivo

AULD, William. *75 jaroj: Aŭtobiografio, poemoj, bibliografio* / Red. Aleksander KORĴENKOV. — Jekaterinburg: Sezonoj, 1999 — 48 pĝ + 8 pĝ (kun fotoj).

Finfine aperis libro, kiun certaj uzantoj de Esperanto atendis dum multaj jaroj: Ruslanda eldonejo Sezonoj produktis aŭtobiografion de William AULD. La poeto cedis al la longa persvado de Aleksander KORĴENKOV, kaj tiu venis al Skotlando por registri la intervjuon kaj poste fari ĉion ceteran — deĉifri kaj krei la libron. Nemaigrave menciendas sindediĉa kontribuo de pluraj personoj, kiuj kune ebligis la aferon.



Mi ĉiam volis scii pri AULD pli kaj pli, kiam mi unuafoje eklegis lian *Spiro de l' pasio* en la fama *Kvaropo* kaj poste kiam mi bonŝance legis *La Infanan Rason* kaj aliajn originalajn kaj tradukitajn verkojn. Unue, li simple instruis min pri Esperanta vortprovizo — danke al li mi komprenis la esprimpovon de Esperanto. AULD de unu poemo al alia malfermadis al mi sian universon de sentoj kaj ideoj. Do hantis min ĉiama scivolo — kia homo povis tiel senti kaj pensi? Kio kaj kiu(j) influis lin? Kiel li laboris por esti tia, kian ni lin konas el lia riĉega kreaĵo?

Ĉi libro donas respondojn al multaj similaj demandoj. Mem AULD preface avertas kontraŭ eblaj misinterpretoj kaj miskonkludoj ĉerpotaĵoj el liaj verkoj, insistante ke li estas “observanto, ne partoprenanto” de eventoj, kiuj aperas en liaj verkoj. Tra la priskribo de faktoj el la vivo ni povas bildigi nian komprenon pri la fontoj de lia personeco, evoluo, esperantisteco kaj liaj multaj trajtoj de la karaktero.

La volumeto konsistas el kompaktaĵoj kvazaŭĉapitroj priskribantaj diversajn flankojn kaj etapojn de lia vivo. De la unuaj paĝoj iĝas evidente, ke AULD havas pri kio rakonti. Kaj li rakontas, digne kaj simple pri ĉio, kio laŭ li estis grava aŭ havis signifon — de liaj fruaj jaroj ĝis hodiaŭ. Feliĉa infaneco, lernejoj, studenteco, militservo, eklaboro kaj plua laboro, laboro kaj laboro. Sorto enhavoriĉa kaj plena da eventoj — sufiĉas menciigi lian partoprenon en la Dua mondmilito kiel elita flugarmeano.

La leganto ekscias detalojn pri la ekapero de liaj unuaj poemoj, kiel li decidis iĝi verkisto nur en Esperanto, kiel li laŭgrade ekhavadis verajn amikojn en Esperantujo, kiujn li mem nombras feliĉe multaj. Li senhezite rakontas pri siaj iamaj kaj nunaj plaĉoj kaj malplaĉoj — cetere ĉiam tolereme kaj digne. Legante oni laŭgrade ensorbas lian rilaton al la vivo, liajn starpunktojn pri tiu aŭ alia fenomeno, evento aŭ detalo. Vi povas ne konsenti kun li pri io, sed vi ne sentas iun ĝenon pro tio.

Avide mi legis pri lia eklerno de Esperanto. Feliĉe lia skoltestro simple donis al li lernolibron demandite pri Esperanto.

Sendube unuj el la ĉefaj fontoj de Aulda personeco, kiu integras kun lia esperantisteco, estas lia ĉiama legemo kaj laboremo, sendube heredita de liaj gepatroj. Verŝajne ankaŭ tio ke lia patro ĉiam klopodis eduki en li memstarecon en liaj decidoj.

Studente li diligente lernis la skotajn lingvon kaj literaturon kiel ankaŭ la francan. Verŝajne lia profunda studo de astronomio ankaŭ multe gravis por tio kion li poste verkis. Ke li persiste

uzis Esperanton kun sia amiko John FRANCIS kaj poste, kiam li praktike aliĝis al Esperantujo, kun sia plej bona amiko Reto ROSSETTI, devis kontribui al lia kreemo en Esperanto. AULD per tuta sia vivo montras al la anoj de la Internacia Lingvo de ZAMENHOF, kiel oni rilatu al sia lingvo kaj ties kulturo.

AULD iras sian vojon: tradukas kaj verkas poemojn kaj prozaĵojn, redaktas plurajn elstarajn eldonaĵojn kiaj Esperanto, Belarto, Monda Kulturo, Fonto, Brita Esperantisto; postenas movade, instruas, verkas lernolibrojn kaj informajn studojn, prezidas la Akademion. Ŝajne sekecaj faktoj pri diversaj eventoj kaj travivaĵoj kaptas vian atenton per sia unikeco, kiel ekzemple lia intima kunlaboro kun Ivo Lapenna dum la transportado de UEA el Britio al Nederlando.

Ne hazarde AULD renkontiĝis kun la elstaraj eminentuloj kiaj Gaston WARINGHIEN, Paul NEERGAARD kaj multaj aliaj. Ĉiuj ili kompletigas unu la alian, kune kreante la escepte allogan — sed dume ne de multaj komprenatan — valoron de la kultura idiomato Esperanto.

Ĉu multaj el ni havas veran multan plezuron en Esperantujo? Ĉu multaj el ni serioze legas Esperanto-literaturon, profunde sentas kaj pripensas prilingvajn kaj prikulturajn problemojn?

Escepte interesaj por mi estas Auldaj opinioj pri la iamaj kaj nunaj esperantistoj, institucioj, fenomenoj kaj literaturaĵoj. Kelkajn faktojn mi nenie antaŭe povis renkonti kaj ofte eĉ imagi.

La vivo de AULD pruvas la nerefuteblajn valorojn, kiujn nia mirakla kaj tiom malfacila lingvo portas kaj donas al tiuj, kiuj elektis partopreni en Esperantujo. AULD konfirmas la miraklecon de Esperanto kaj sobre-optimisme insistas pri stabileco de la Afero en la nuntempa mondo. Apenaŭ oni povus nomi AULD “poeto sen

popolo”. Samtempe li sobre kvazaŭ avertas kontraŭ pasiva kaj konsumisma rilato al la lingvo kaj ties kulturo. AULD certas pri la vera internacia intimeco, kiun ebligas Esperanto al ordinaraj homoj.

Endas pensi pri ĉio ĉi, eble eĉ diskuti kaj disputi kun AULD — pri la eblaj evolu-tendencoj de la tuta Esperanto-komunumo, ĉar ofte oni povas renkonti tute malajn inklinojn ĉe Esperantistoj ol simple strebi intimiĝi kun aliaj gentanoj. Samtempe AULD kun bedaŭro notas certajn liavidajn mankojn en Esperantujo, ĉefe la foreston de la vera internacieco de Esperanto-uzantoj kaj milde kritikas la nunan UEA por ties “paroĥismo”.

La bibliografio fine de la libro donas la impreson pri la konkreta kontribuo de AULD al nia kulturo, al kiu normala konscia parolanto de Esperanto ne povas ne senti feliĉon partopreni.

La libro abundas je faktoj, nomoj de personoj kaj aferoj; eventoj, pensoj, pritaksoj. AULD fiere kaj ame rakontas pri siaj familianoj kaj amikoj. Pluraj kortuŝaj bildoj pri Auld en diversaj cirkonstancoj el lia persona arĥivo. Kompletigas la libron poemoj elektitaj de la aŭtoro. Ili ludas apartan rolon. Se troviĝos legonto de la aŭtobiografio, kiu aŭdos la nomon William Auld unuafoje, li aŭ ŝi povos tuj ricevi la enviindan impreson pri la kreado de la majstro. Kaj leginte titolojn de liaj verkoj li aŭ ŝi nepre ekvolu legi la verkon mem.

La libro impresas trafe bona, ĉar ĝi estas sincera, sobra, plena da gravaj faktoj kaj ideoj. Estas nur bedaŭrinde ke tiu ĉi volumeto estas tro mallonga kaj havas tro malmultajn (nur 17) fotaĵojn.

Andrej PEĈONKIN (Ruslando)

La Ondo de Esperanto. 1999. №11 (61)

Esperanto en la universitata kaj lerneja medioj en Madagaskaro

La internacia lingvo Esperanto hejmiĝis en la universitata medio de Madagaskaro per la agadoj de la E-kluboj Brilanta Suno kaj Amikeco kaj ankaŭ en la lernejo *Bouba* per la E-klubo Progreso. La estrino de la koncerna lernejo estas Rasoarimalala SAHOBY, fervora e-istino, kiu kuraĝigas siajn gelernantojn pri Esperanto-lernado. Rezulte, entute 309 gelernantoj de kvin klasĉambroj lernas nian lingvon kiel devigan lernobjekton en *Bouba*. Temas pri io serioza kaj grava.



Bouba estas la unua lernejo enlande, kiu akceptis kaj enkondukis la instruon de E-o en siaj lerno-programoj, dank' al klopodoj de la Centro Internacia pri Esperanto (CIE). La direktorino de la koncerna lernejo do kun-laboras kaj partoprenas en la disvastigado de la lingvo man-en-mane kun CIE.

Pro malbonaj vivkondiĉoj kaj tiurilataj problemoj en Madagaskaro, CIE bezonas kaj petas helpon por plu-okazigi serene siajn agadojn en la kampo de instruado. Multas nun la laboro, sed mankas rimedoj kaj jen kial do bonvena estos via subteno al la konto rabv-y de UEA aŭ rekte per *Western Union* al *Centre*

International d'Espéranto, Boîte Postale: 3171 MG-101 Antananarivo, Madagaskaro.

CIE oficiale ricevis agnoskon de UEA kaj rajtigon de la enlanda ministerio pri klerigado por organizi E-kursojn en duagradaj lernejoj ekde la jaro 1986. Ĝi

organizas du nivelajn ekzamenojn ĉiujare kun disdono de diplomoj al la sukcesintoj.

La lernejo *Bouba* serĉas kaj bonvenigas ko respondajn ligojn kun aliaj eksterlandaj lernejoj en Esperanto, en la franca, angla kaj germana lingvoj, kiuj samgrade estas instruataj en ĝi. La lerneja adreso: *Collège Bouba*, Lot: IVF 75 *Ambodihady/Ambohimanarina*, Antananarivo-101 *Madagascar*.

Désiré RABEVAZAH
Esperanto en Afriko, n-ro 32